



PENSEO

N-ro 114

Apr./2001

**Monata Beletra Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski, 1994**

Fondita en 1990; Enretigita en 1997

www.anteo.domainvalet.com

✦ MIKRONOVELO

Muta Junulino

An Qing

Apud la parko de urbeto malfermiĝis butikio por vendi pentraĵojn. La mastro de la butikio estis junulino, delikata, beleta kaj bonhumora, sed, bedaŭrinde, muta. Oni ne sciis, de kie ŝi venis, kaj nur tion, ke ŝi ne nur vendas pentraĵojn, sed ankaŭ lertas en pentrado. Floroj kaj birdoj estis ŝiaj ŝatataj temoj en pentrado.

Dum Valentena tago, multaj bukedoj da rozoj estis vendataj en la strato. Ŝi tamen pendis sur la pordo de la butikio pli ol cent pentraĵojn de rozoj en diversaj pozoj, kaj krome alian afiŝon, kiu legiĝis, "Freŝaj rozoj velkos, dum tiuj surpaperaj rozoj floras por ĉiam." Ŝiaj pentraĵoj forvendiĝis tre rapide neatendite.

Kvankam ŝi estis muta, ŝi tamen sin montris bele impresiva. Ŝiaj ovala vizaĝo, rekta nazosto, maldikaj kaj iome longaj lipoj, iomete levitaj buŝanguloj, kaj klara kaj flua konturo konverĝis en la impreson de saĝeco kaj virteco. Sed en ŝiaj rigardoj kaŝiĝis profundaj zorgoj. Oni bedaŭris, kial ŝi, kun tiel bela kaj bona aspekto, devas esti mutulino. Vere estis, ke neniŭ estas perfekta.

Ĉar ŝi ne povis paroli, ŝi fiksas sur sia vendotablo nigran tabuleton, tiel ke aĉetantoj povu skribe konversacii kun ŝi.

Autune okazis ekspozicio de pentraĵoj en la urbeto. Iutage eksterlanda gasto en akompano de la urbeto aŭtoritatulo venis por viziti historiajn vidindaĵojn. Post kiam li pririgardis templojn, la aŭtoritatulo diris al li, "En nia urbeto estas okazigata ekspozicio de pentraĵoj. Bonvole honoru ĝin per via vizito."

Kun granda intereso, la gasto kaj aliaj akompanantoj pririgardis la pentraĵojn. Unu pentraĵo, titolita "Birdetoj Kantas", imponis al ili. Sur la pentraĵo, aro da birdoj gaje kantas super vasta akvo,

kaj ĉe la akva rando knabino, kun etenditaj sveltaj longaj brakoj, kontemplas seriozmiene la birdojn sur la ĉielo. La subskribinto de la pentraĵo estis "Mutulino".

Post tio, la eksterlanda gasto kaj aliaj akompanantoj vizitis la butikon de Mutulino. La gasto elektis kelkajn pentraĵojn, inkluzive de tiu titolita "Birdetoj Kantas", kaj oferis la totalan prezon de 100,000 dolaroj por aĉeti ilin. Mutulino neniel elvendis la pentraĵon "Birdetoj Kantas" en la ekspozicio. Kvankam la aŭtoritatulo faris al ŝi persvadojn kaj la gasto altigis la prezon, ŝi tamen obstine rifuzis. Kun granda bedaŭro, la gasto forportis aliajn pentraĵojn. Pro tio ŝi fariĝis famulo en la urbeto.

De tiam ŝia butikio fariĝis homplena kaj ĉiuj pentraĵoj fare de ŝi estis konkure elaĉetitaj. Sed ŝi estis serioza pri sia pentrado. Ĉiutage ŝi produktis nur unu aŭ du pentraĵojn kaj pentris laŭ sia bontrovo, neniam obeante alies postulon. Por tiu pentraĵo "Birdetoj Kantas", multaj proponis altajn prezojn por aĉeti kaj ŝi neniel ĝin forlasis. Do, ŝiaj pentraĵoj fariĝis famaj artikloj en la urbeto.

Unu tagon, maljunulo kun longa barbo eniris ŝian butikon. Post pririgardo al ŝiaj pentraĵoj kaj zorgema kontrolado al ŝiaj brovoj, oreloj kaj langa tegaĵo, li diris pere de skribado sur la nigra tabuleto, "Mi povas kuraci vian malsanon, almenaŭ mi povas resanigi vin." Post tio, li volis palpi al ŝi la pulson, sed ŝi rifuzis.



Mutulino,
kiu ĉiam sin
donis al

pentrado, sukcesis krei serion da pentraĵoj titolitan "Birdetoj Flugas sur la Ĉielo", kiu aperigadis sur diversnivelaĵ pentraj-gazetoj. Ŝi sin trovis en altgrada

stato de kreado kaj pro tio kelkfoje ŝi eĉ ĉesigis sian negocadon.

Post kelkaj tagoj, la maljunulo venis refoje. Li diris, “Miaopinie, vi afaziigis ne denaske, sed pro ia kaŭzo. Mi okupiĝas pri kuracado dum plejparto de mia vivo kaj akumulis kelkajn spertojn, tiel ke mi akiris iom da sukceso en kuracado de tiaspecaj malsanuloj. Por ke mi faru ion praktikan por talenta junulino, mi akceptos nenian groŝon en via kuracado...”

Ŝi aparte, la mutulino absorbite miksis farbojn kaj disvolvis paperon por fari pentraĵon titolitan “Tankvileco”, kiun ŝi konceptis antaŭan nokton. Kvazaŭ en la cirkonstanco sen ajnaj ĉeestantoj, ŝi ĝin elfaris malpli ol du horojn. Ŝi montris la pentraĵon al la maljunulo. Sur ĝi birdo ŝvebas sur la pura ĉielo senzorge kaj libervole super pura marakvo. Poste ŝi skribis sur la nigra tabulelo por respondi al la maljunulo, “Ĝuste pro tio, ke mi ne afaziigis denaske, mi rifuzas vian kuracadon. Mi volas teni al mi trankvilecon, en kiu, mi pensas, mi povas produkti pli multajn kaj pli bonajn pentraĵojn. Mi dankas vin pro via bona volo.” Kaj ŝi donacis la pentraĵon al la maljunulo. Li senvorte akceptis ĝin kaj eliris el ŝia butiko.

Post kelka tempo la butiko fermiĝis. Kelkaj diris, ke ŝi iris aliloken por fari skizadon, aliaj asertis, ke ŝi malfermis alian pentraĵbutikon en alia urbeto, triaj opiniis, ke ŝi ne vendas pentraĵojn plu, sed absorbiĝas en kreado, kaj kvaraj certis, ke la fremlanda gasto invitis ŝin al... Onidiroj variis, sed neniu sciis la veron.

elĉinigi Lunlun

*** *** *** *** ***

EL «LAŬZI»

ĈAPITRO 19

(Laŭzi rekomendas revenon al la simpla stato de la naturo. Laŭ li, la plej efika maniero de la regado de regno estas modestigi la eksterajn, simpligi la menson, bridi la egoismon, malpliigi la dezirojn, kaj forjeti la klerecon ktp.)

Forigu la saĝecon kaj rezignu la sagacon¹,
Kaj la popolo havos de tio centoble pli da bono.
Forigu la virton kaj rezignu la juston²,
Kaj la popolo revenos al fila devo kaj gepatra amo.
Forigu la ruzon kaj rezignu la profitecon,
Kaj malaperos ŝtelistoj kaj rabistoj.
Tiuĉi tri, kiel principoj, tamen ne sufiĉas,
Tial devas ekzisti ankoraŭ aliaj, sekvendaj por la
popolo:
Modestigi la eksterajn kaj simpligi la menson,
Bridi la egoismon kaj malpliigi la dezirojn,
Forjeti la klerecon³, por ke oni ne plu konu la
malĝojn.

¹ Ĉi tie la “saĝeco” kaj la “sagaco” aludas la ruzecon kaj hipokritecon.

² La “virto” kaj la “justo” propre devus servi kiel edifaj rimedoj, sed ofte ili estas uzataj kiel maskoj por kovri hipokritajn kaj malbonajn agojn.

³ Same kiel noto 1 de tiu ĉi ĉapitro.

ĈAPITRO 20

(Laŭzi rigardis vulgaraĵojn la ordinaraĵojn, kiuj vivis gaje kaj senzorge, dum li sentis sin stulta, malklera, senkapabla kaj mallerta. Kial do? Ĉar li, nutrata de la Taŭo, jam eniris en sublimigitan staton, en kiu lia sintenado al la vivo fariĝis diferenca de tiu de la ordinarioj. Ĉi-sence dirite, la stulteco de Laŭzi estas ĝuste lia saĝeco, kiu ebligas al lia spirito penetri profunde en la vivon, dum la saĝeco de la ordinarioj estas nur la manifestiĝo de la supraĵo kaj malprofundeco de ilia spirito.)

Kia estas la diferenco inter jes-respondo kaj riproĉo?

Kia estas la diferenco inter la bono kaj la malbono?

Tio, kion aliaj timas, ne povas ne esti timata.

Tiele estas de la pratempo kaj tiele restos eterne!

Ĉiuj aliaj homoj estas tiel gajaj kaj senzorgaj,

Kvazaŭ ili partoprenus en festenado

Aŭ ascendus belvidejon por ĝui printempan pejzaĝon,

Dum nur mi sola estas indiferenta, apatia,

Kvazaŭ mi estus bebo ridi ankoraŭ ne povanta,

Aŭ senhejmulo, kiu vagadus lace.

Ĉiuj aliaj homoj havas superfluaĵojn,

Nur mi sola kvazaŭ suferas je nesufiĉeco.
 Ho, kia stultulo mi estas, kiu estas en plena
 malklereco!
 Ĉiuj aliaj homoj estas klarmensaj,
 Nur mi sola estas en spirita nebuleco.
 Ĉiuj aliaj homoj estas sagacaj,
 Nur mi sola havas obtuzan kapon.
 Ĉiuj aliaj homoj estas kapablaj,
 Nur mi sola estas mallerta.
 Mi sola estas diferenca de ili ĉiuj,
 Ĉar mi estas nutrata de la Patrino, la Taŭo.

Trad. Wang Congfang



MODERNAJ POEMOJ
MODERNAJ POEMOJ

Mi Havas Nigran Koltukon

Ma Li

malaperis vojoj
 kaj telefonaj stangoj
 jam kovris du liniojn da piedspuroj polv' el dista loko
 do kiun mi atendas fine

ne neĝas, ĉi tie estas sudo
 ekblovas vent'. La tutan vintron ventis
 survoje, maljunuloj jen volviĝis en surtuto
 virinoj jen surhavis kaptukon koloran
 mi dubas, ĉu tia frido regis
 koltukon nigran havas mi sur mia kolo
 kiun li donacis al mi
 neniuj scias
 fieras mi, ĝi estas nigra
 flirtanta ĉiam kiel nigra algo
 ĉi tie staru por momento
 ne movu viajn paŝojn, nee
 ĝis la tagmezo, aŭ ĝis la vespero
 ĉar ĝuste tie ĉi sin trovis granda ŝtono
 kaj feniksa arbo
 ni sidis tie, ĝuste tie
 ĉiufoje, kiam vent' levblovis
 baskon mian, mi sin turnis

ve, sed nun
 por kio mi venas ĉi tien
 kaj kial mi ankoraŭ tenas vin en mia penso
 forgesis mi lin certe
 forgesis, vere

alia venta hasta teda vesperiĝo
 ĉi tie nur mi staras
 surhavas nur mi nigran la koltukon
 mian nigran aglon

malaperis vojoj
 kaj telefonaj stangoj
 jam kovris du liniojn da piedspuroj polv' el dista loko
 do kiun mi atendas fine
 ĉu aŭ ne... atendas mi la neniaman
 vesperon vintran? se ne
 do kiun mi atendas fine

elĉinigi Lao Shi



Sopiro

Ĉuisto

La lum' de sun' subira
 reflektas florkolore
 aspektas jen altira
 resaltas alten sore.
 Al vi ĝi per zefiro
 kunportas kun deziro
 mesaĝon bonhumore.



Vintro sen Neĝo

Yang Liuhong

mi senĉese preĝas por vi
 veran vintran la neĝadon
 tamen nure nigra grundo
 montras sian novan estetikon

 vi admonis
 mi atendu ne plu

